

GRUPA VIVO

DISAJ KONSILOJ KAJ SUGESTOJ POR LA SEKCIESTROJ DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.

Korespondadreso : Vrijheid 98, ARENDONK.

Nº 3

5/II/1938

Estimataj Samideanoj !

Alproksimiĝis denove la vintra sezono.-

Forlasitaj kampoj, malgajaspektaj stratoj, vento, pluvo, baldaŭ neĝo kaj frosto...

Sed la endormiĝo de la naturo kvazaŭ estas signalo por ekvekiĝo de nova vivo en niaj sekcioj. La vesperoj plilongiĝas, en la klubejoj ĝoje ronkas la forno, regas agrabla, milda varma atmosfero en la ĉambro kaj en la koroj.

Kaj por multaj el niaj sekcioj tiu reviviĝo de la kluba agado samtempe signifas novaj zorgoj kaj klopodoj; de ili plejparte dependas ĉu vere la klubvesperoj estos tiel instruaj kaj samtempe agrablaj kaj amuzigaj ke ĉiu membro ĉiam denove senpacience atendas la alvenon de la invitokarto anoncanta novan kunvenon de la esperantista klubo.

Jes, karaj kunlaborantoj, mi scias, kompili kaj ellabori sufiĉan materialon per kio teni viajn klubanojn en vigla interesiĝo dum unu sola vespereto, postulas de vi la oferon de multaj, foje maloftaj horoj de via libera tempo... Sed ne vane estos via laboro: ĉu vi ne fieras vin senti kiel aliaj "Chamberlain"-oj, malpli grandstilaj certe, kaj ne tiel mondkonataj, sed ne malpli meritaj, kiuj tago post tago, obstine kaj daŭre, plenumas vian karan devon preparante la tutmondan pacon, en la servo de via idealo, kaj sen alia rekompenso ol la konscio: "mi alportas mian ŝtoneton por la finfarado de la granda paco-konstruaĵo".?... Perforto kaj hombuĉado ĉiuloke en nia mondo, ĉiuj landoj en freneziga timturmento antaŭ la okazontaĵoj, armigadoj kiuj elsuĉas la lastajn monrimedojn de popoloj kiuj jam pereas en mizero, ĉu ĉio tio denove ne klare pruvas ke urĝas la tempo kiam la "tutmonda familio" konvinkiĝos ke ili mem estas la nura kaŭzo de sia malfeliĉo? Ho, malkuraĝe ne levu la ŝultrojn kaj grumblu pri "utopio". La realeco estas ke jam multe aliĝis en la menso kaj en la koro de la vastaj tavoloj. Ne plu estas la tempo kiam la homaro en raviĝo admiris iun imperiestron aŭ aventuriston kiu kapablis milite konkiri la duonan globon. Veraj herooj nuntempe estas tiuj kiuj sen altrudaj rimedoj, antaŭgardas la pacon. Ĉu ne estas ke dum certa momento de la pasintaj semajnoj kiam la militodanĝero ŝajnis plej minaca, ĉiuj politikaj partioj kvazaŭ vetbatalis por aspekti en la okuloj de la publiko, la probatalantoj de la paco?... Al ni, pacaj batalantoj ne por unu momento, sed por kiuj la mondpaco iĝis vivkoncepto, al ni profiti la nunmomentan spiritostaton, favoran al la ideo de mondpaco. Veniam la momento estis pli oportuna, kaj neniam en la historio la materiaj cirkonstancoj, la teknikaj evoluo kaj kondiĉoj estis pli favorej.

Ĉu vere ni, malfortaj hometoj kompare al tiuj gigantoj de la mondpolitiko, povas havi ian influon en la duelo inter mondpaco kaj milito? Certe jes, kaj ne nur ni povas influigi, sed se estas la volo de ĉiuj ni, ni faros ke la mondo havos pacon. Necesas nur tiu tre simpla rimedo: 1) propagandi ĉie, ĉiel kaj ĉiam nian karan esperanton.

2) peni per ĉiuj fortoj por ke la membroj de niaj kluboj iĝu modelaj esperantistoj ne nur rilate la lingvon sed ankaŭ rilate la ideon.

En plej multaj el niaj sekcioj okazis pasintjare Cseh-metoda kurso. Estas do nun la momento firme komenci la agadon sub §2. Antaŭ ol komenci la laboron, ni tamen devas fari al ni nete difinitan ideon pri tio kion ni volas atingi, kaj esplori la rimedojn per kiuj ni povos atingi ĝin. Tio estos tiam:

LA VINTRA PROGRAMO DE LA SEKCIO.

I) INTERNA LABORO DE LA SEKCIOJ:

A) Ĉiu nova sekcio, kaj ankaŭ la malnovaj sed kun novaj anoj, devas organizi daŭrigan kurson, tio signifas ke ili devos: 1) rapide rememorigi tion kion oni jam lernis pli frue; 2) daŭrigi la studadon de la lingvo kaj perfektigi en la praktika uzado de Esperanto.

En la sekcioj kie jam estas kelkaj esperantistoj, ne estos multe da malfacilaĵoj por aranĝi tion, kaj certe estos unu inter ili kiu prenos sur sin la taskon gvidi tian daŭrigan kurson. Ĉi tie mi mencias ke en Flandra Esperanto Instituto estas havebla tre taŭga libro por tiu celo, "La Ĉiutaga Vivo", kiu kostas la vere ridinde malalta prezo de nur 3.50 fr.- Je mendo de almenaŭ 10 ekzempleroj, la prezo estas nur 2 fr. Mi rekomendas ĝin ĉar ĝi speciale taŭgas por la praktika uzo de la lingvo kaj entenas aron da ekzercoj sur la plej kutimaj aferoj el la ĉiutaga vivo kiel la titolo mem de la libro indikas. Bona libro por gramatika instruo estas "Esperanto in 25 lessen", eldonita de la Kurso Centro de Fl.L.E., mendebla por fr.17.50 je poŝtkonto 335.183 (S.ro H.Rainson) Hombeeksche steenweg 54, Mechelen.

Sekcioj kies membroj ĉiuj estas same novaj esperantistoj, ofte havas la ekazon alvoki la kunhelpon de spertulo el apuda loko. Tamen se tio ne eblas, mi rekomendas ke oni tralustu sub la gvidado de la plej lerta, la ĉi-supre jam nomitan libron "Esperanto in 25

"...se neniu malfacilaĵo al tiu studmaniero, kaj ankaŭ por la gvidanto estas tre

facila afero, ĉar ĉiu leciono enhavas la korektitajn taskojn kaj ekzercojn de la antaŭa leciono.

B) Ĉar nepre necesas ke la klubvesperoj estu sufiĉe interesaj, parto de ĉiu kunsido estu rezervata por pli agrabla aranĝo, amuzaj ludoj kiuj samtempe povas esti same lernigaj, konversacio en esperanto, prelegoj, riparolado de la klubo vivo mem..

C) estas tre bone de tempo al tempo inviti paroladiston aŭ prelegiston de apuda sekcio. Vi scias ke Flandra Ligo, kies estraro ne timas la laboron, organizis speciale tiu-cele la Servon de la Prelegistoj, kiu certe estos valora helpo por niaj sekcioj. (Vidu tiu-rilate la numeron 6 de Komunikoj de la Estraro).

Jen kiel S.ano E. Malmgren, estro de la propaganda fako de I.E.L. kaj alte taksita spertulo en la fako, prezentas al si modelan skemon por klubaj kunvenoj, kiun mi rekomendas adopti aldone al la parto de la kunveno rezervota al la daŭriga kurso :

Semajno N ^o	1	2	3	4
Kanto	x	x	x	x
Esperanta literaturo				x
Esperanta historio		x		
interpreta ekzerco	x		x	
Viva gazeto		x		
Teatraĵo				x
Lingva kvaronhoro	x		x	
Klubaj aferoj	x		x	
Liberaj temoj				x

(vojaĝrakontoj k.t.p.)

La sama programo sin ripetas ĉiu-monate ekcepte ke la lastan semajnon de ĉiu dua monato oni anstataŭigu la kvaran punkton de la programo per ĉanĝvespero, ludoj aŭ io simila.

Mallonge : ni celu al tio ke, en la sekcioj, kie pasintjare okazis Cseh-kurso, ĉiuj la membroj la eble plej rapide havigu al si la kapablojn plej elementajn; kaj kiel ekzemplon mi nomas ĉi-sube la kondiĉojn kiuj rajtigas la esperantistojn en Nederlando partopreni en la ekzamenoj por la diplomo A (lingva kapablo):

Skribe: 1) traduki simplan tekston el la Esperanta lingvo, 2) traduki simplan tekston en Esperanton, 3) skribi mallongan diktaton en Esperanto.

Parole: 4) voĉlegi mallongan simplan E^o tekston kaj traduki ĝin; doni respondon al kelkaj demandoj rilate al la gramatiko de la legitaĵo; 5) simpla konversacio en E^o; 6) kelkaj scioj pri la E^o-movado kaj historio. Krom tio la kandidato devas esti studinta la Fundamentan Krestomation de D-ro Zamenhof, paĝoj 1-177 kaj 268-316.

La jam pli spertaj esperantistoj kiuj povas alceli la akiron de la diplomo B devas :

Skribe: 1) Traduki fragmenton el E^o-verko aŭ -revuo; 2) traduki nederlandan tekston en E^o; 3) fari redaktaĵon en E^o, ĉe kio ili povas elekti inter seso da donitaj temoj; 4) skribi E^o-diktaton.

Parole: 5) havi sciojn pri la E^o-literaturo kaj esti leginta almenaŭ seson da E^o-verkoj, el kiuj 2 de D-ro Zamenhof kaj esti pristudinta 4 aliajn el aldonita listo tiamaniere ke, krom demandojn rilate al la enhavo, ili povas respondi al kelkaj simplaj demandoj pri la stilo (vortordo, verkmaniero, vortuzado k.t.p.) de la legita tuto; 6) havi sufiĉajn sciojn pri la E^o-movado kaj ĝia historio; 7) bone estru la tutan E^o-gramatikon kaj povi klarigi ĝin Nederlandlingve; 8) paroli Esperanton flue kaj senerare.

Kiel anoncite en la lasta numero de Flandra Esperantisto, la estraro de Flandra Ligo nuntempe ankaŭ pristudas la starigon de Ekzamen-komisiono por nia lando.

II) PROPAGANDA LABORO: Vi ĉiuj scias ke la Kurso Centro organizas korespondajn kursojn. En la sekcioj kie nunvintre ne okazas elementa kurso, ĉiuj la klubanoj devas propagandi en sia loko por varbi lernantojn por tiu koresponda kurso. La tuta kurso kostas nur fr. 12.50 kaj la taskoj estas senpage korektataj de la Kurso Centro. Jen ankoraŭ tre facila rimedo por havigi al via klubo novajn membrojn post la fino de la koresponda kurso. Sekcio kiu sukcesis lernantojn por la koresponda kurso zorgu ke tiuj lernantoj de tempo al tempo estu vizitataj de membroj de la klubo, aŭ invitu ilin kelkfoje al la komuna kunveno por kune prilabori la taskojn de la kurso. Ankaŭ iu de la sekcio povas korekti la taskojn (anstataŭ sendi ilin al la Kurso Centro). Tio plifaciligos la varbadon post la kurso.

SEKCIOJ kiuj deziras mem organizi elementan kurson laŭ iu aŭ alia metodo, kompreneble plene rajtas tion fari.

Ne forgesu ke per la materialo de la MIGRANTA EKSPozICIO de Flandra Ligo, vi povas aranĝi tre efikan propagandotagon en via komunumo.

Ankaŭ pensu al tio ke dum la vintro-sezono viaj klubanoj havas pli multan tempon por legi. Tial rapidu organizi vian KLUBBIBLIOTEKON.

La ĉi-supra skemo por VINTRA-AGADO estis necese konciza, kaj mi nur povis doni tre rapidan superrigardon pri tio kio devos okupi vin dum tiu sezono. Pliajn klarigojn kaj detalojn tre volonte donos perletere

via

Ant. DE TROEYER
Grupkonsilanto Fl.L.E.
Vrijheid 98-ARENDONK